


Eŭropa Bulteno

Aprilo 2014, Numero 137

NE OFTE NI KONGRESAS ĈE LA MEDITERANEA BORDO



La 10-a JUBILEA KONGRESO DE EEU povus esti unu la plej malgrandaj el ĉiuj ĝisnunaj. Ĝis la lasta rabatita aliĝperiodo aliĝis nur 100 kongresanoj.

Vi ankoraŭ povas helpi plibonigi la situacion: aliĝu tuj. Venu al eŭropa regiono kiu apartenas al la plej belaj naturaj lokoj de Eŭropo, apud blulazura Adriatika maro. Tuj apud Rijeka estas fama turista urbeto Opatija en kiu siatempe regule feriiis aŭstrohungaraj reĝoj kaj aristokrataro, en kiu ankoraŭ estas originalaj hoteloj el tiu periodo. Aliflanke estas bela karsta insulo Krk ligita per ponto kun la bordo kaj direkte al la interno de la lando troviĝas montoj kaj regiono plena je ĉiaspecaj arbaroj kaj netuŝita naturo. Se vi ne decidis kie ferii, aliĝu al la kongreso kaj eventuale ankaŭ al la antaŭkongreso, kiu kondukas vin al la plej belaj vidindaĵoj de Kroatio: La naciaj parkoj Kornati (neloĝata insularo) kaj la Lagoj de Plitvice. Kiu ankoraŭ ne estis en la 28-a lando de EU, eluzu la okazon kaj venu.

Provizora programo de la 10-a kongreso de EEU en Rijeka 6.-12.7.2014

Dimanĉo, la 6-an de julio 2014:

10:00-22:00	Akcepto de la kongresanoj.
13:00-19:00	Kroatia tago: Programo por kroataj esperantistoj.
20:00-21:30	Folkloro muzikprogramo de la folkloro grupo el Rijeka.

Lundo, la 7-an de julio 2014:

Granda salono:	
10:00-12:00	Solena malfermo de la kongreso (fine de la Malfermo estos Solena transdono de la Premio Cigno).
14:00-15:00	Kongrestema prelego: Seán Ó Riain: <i>Kial gravas lingva justeco en Eŭropo?</i>
15:00-16:00	Kongrestema prelego: Milorad Pupovac, parlamentano de kroatia parlamento, universitata profesoro.
16:00-17:00	Kongrestema prelego: Nikola Rašić, sociologo kaj lingvisto, interpretisto, Roterdamo.
17:00-18:00	Emil Heršak, profesoro, „Globaligo kaj lingvo“
20:00-21:30	Muzikkoncerto de Georgo Handzlik kaj Saša Pilipović.
Malgranda salono:	
15:00-15:30	M. Cwik: Necesaj elementoj por long-daŭra kohezio en la Eŭropa Unio
15:30-17:00	Filmo pri ekspedicio „ <i>Sur la spuroj de Tibor Sekelj</i> “.
17:00-18:00	Thiery Saladin prelegos pri Peticio por Esperanto ĉe AVAAZ.
Tria salono:	
10:00-18:00	Libroservo, ekspozicio pri Kroatia E-Movado.

Mardo, la 8-an de julio 2014

Granda salono:	
10:00-12:00	Unua kundiso de la Asembleo de EEU (FERMITA, nur por la assembleanoj kaj anstataŭantoj).
14:00-15:00	Kongrestema prelego: Jagoda Granić, universitata profesorino el Split.
15:00-15:45	Zlatko Tišljar, estrarano de EEU: „ <i>Zagreba Metodo instrui Esperanton</i> “
15:45-16:30	Sean O Riain: „ <i>Pri la Platformo pri multlingvismo de Europa Komisiono – ŝanco por Esperanto?</i> “
	16,30-17,00 Vjekoslav Morankić, membro de Loka Kongresa Komitato, ekonomikisto prelegos pri EU kaj identeco
17:00-17:30	Petro Balaž „ <i>Ekonomia forumo en Krynica, Pollando</i> “.
17:30-18:00	Jozefo Reinvarť „ <i>Nacia Konvencio pri EU - tutsocia diskutplatformo en Slovakio - modelo por EU membro-ŝtatoj</i> “.
20:00-21:30	Koncerto de popularaj operarioj en Esperanto de Neven Mrzlečki.
Malgranda salono:	
10:00-12:00	Prezento de novaj libroj. Gvidas: Spomenka Štimec.
16:00-18:00	Dokumentaj filmoj el la historio de Esperanto.
Tria salono:	
10:00- 18:00	Libroservo, ekspozicio pri Kroatia E-Movado

Merkredo, la 9-an de julio 2014

8:00-19:00	Tuttaga ekskurso al regiono de Gorski Kotar.
Granda salono:	
20:00-21:30	Teatraĵo de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik: „ <i>Societo de viktimoj</i> “.

Ĵaŭdo, la 10-an de julio 2014

Granda salono:	
10:00-12:00	Dua publika kunsido de la asembleo de EEU: <i>Strategio por Esperanto en EU</i>
14:00-15:00	Heidi Goes: <i>Pri la indonezia lingvo kaj ties evoluo kiel ŝtata lingvo de Indonezio.</i>
15:00-16:00	Velimir Piškorec: <i>Universitata instruado de Esperanto en Zagreba Universitato.</i>
20:00-21:30	Koncerto je marimbo de Kaja Farsky.
Malgranda salono:	
16:00-18:00	Dokumentaj filmoj el la historio de Esperanto
Tria salono:	
10:00-18:00	Libroservo, ekspozicio pri Kroatia E-Movado.
Aliloke:	
13:00-19:00	Duontaga ekskurso tra Rijeka kaj ĉirkaŭaĵo.

Vendredo, la 11-an de julio 2014:

Granda salono:	
10:00-12:00	Publika debato pri eblaj poresperantaj agadoj loknivele en la moderna tempo (enkonduko de Anton Mihelič, Slovenio).
14:00-15:00	Faka kunsido EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto).
15:00-16:00	Festkunsido de Asocio de Verduloj-esperantistoj okaze de 30-jariĝo.
16:00-17:00	Pri la projekto de EEU: LINGVO.INFO – prezentas Maja Tišljar kaj Petro Balaž.
17:00-18:00	Du prelegoj de Johan Derks: pri -ujo/-io disputo kaj pri E-biblioteko en Burundio.
20:00-21:30	Koncerto de la Zagreba grupo Druid.
Malgranda salono:	
14:00-14:30	Bernhard Tuidar: Pri la E-muzeo en Vieno
Tria salono:	
10:00-18:00	Libroservo, ekspozicio pri Kroatia E-Movado.
Aliloke:	
14:00-18:00	Duontaga ekskurso tra Rijeka kaj ĉirkaŭaĵo

Sabato, la 12-an de julio 2014:

Granda salono:	
10:00-12:00	Solena fermo.
Tria salono:	
10:00-12:00	Libroservo, ekspozicio pri Kroatia E-Movado.

EEU-ESTRARO REKOMENDAS AL LANDAJ ASOCIOJ SENDI LETERON AL KANDIDATOJ POR EŬROPA PARLAMENTO EN SIA LANDO

Jen malneto de mesaĝo al kandidatoj en la elektoj al la Eŭropa Parlamento:

Estimata kandidato,

Dezirante al vi sukceson en la venontaj elektoj al la Eŭropa Parlamento, bonvolu permesi al nia asocio fari al vi tri demandojn. Viaj respondoj helpos nin rekomendi al niaj membroj kiujn kandidatojn ili apogu.

1. Ĉu vi apogas la propedeŭtikan uzon de Esperanto, t.e. ĝia uzo por plibonigi kaj akceli la lernadon de aliaj lingvoj? La raporto de la Civilsocia Platformo pri Multlingvismo, reprezentanta 29 tut-eŭropajn organizaĵojn kaj starigita far la Eŭropa Komisiono, metas tiun aliron inter la "plej bonaj praktikoj" de lingvolernado, bonvolu vidi la paĝon 9 de la plena raporto de la Platformo, ĉe http://www.poliglotti4.eu/docs/publications/CSPM%20Policy%20Recommendations_FULL%20VERSION.pdf
2. Ĉu vi apogas la rekomendon kanti la Eŭropan Himnon en la neŭtrala lingvo, Esperanto, kiam civitanoj de malsamaj gepatraj lingvoj deziras kanti la himnon kune? Por detaloj pri ĉi tiu propono, kaj por la teksto de la himno kun tradukoj al la 24 oficialaj EU-lingvoj, bonvolu vidi <http://www.europo.eu/en/citizens-initiative>
3. La fama brita aŭtoro, Profesoro Robert Philipson, klare montris en sia libro *English-only Europe?: Challenging Language Policy* (Routledge, 2003), ke Eŭropo survojas al ĉiam pligrandiĝanta dominado de la angla lingvo. Ĉu vi subtenas nur anglalingvan Eŭropon? Se ne, ĉu vi pretas politike agi por subteni la lingvan diversecon?

Anticipan dankon pro via respondo.

A. B.

Prezidanto

Esperanto-Asocio de X-lando.

EEU/Eŭropa Esperanto-Unio: www.europo.eu.

Eŭropaj valoroj en 24 lingvoj: <http://dtisljar.wix.com/europo>

Seán Ó Riain



ELEKTOJ DE LA NOVA ESTRARO DE EEU

Laŭ la statuto de EEU la estraro havas trijaran mandaton. La lastaj elektoj okazis en 2011 kaj do ĉi-jare dum la asemblea kunsido oni elektos novas estraron. Same laŭ la statuto, la proponon por nova estraro faras la estraro kaj dum la asemblea kunsido la asembleanoj povas proponi pliajn aŭ aliajn kandidatojn.

La estraro dum sia marta kunsido en Bruselo konstatis ke la ĝisnuna estraro tre bone laboris kaj plenumis ĉiujn elementojn de la tri mandataj jaroj, ke en tiu mandato okazis gravaj eventoj por la eŭropa E-movado stimilitaj aŭ realigitaj de EEU. Ni citu nur kelkajn: organizo de granda eŭropa konferenco por junaj ĵurnalistoj en Triesto „Kia estus Eŭropo nun sen EU?“ en kiu partoprenis du eksaj ŝtatestroj, pluraj EP-anoj kaj naciaj parlamentanoj, historiistoj kaj ekonomikistoj; akcepto de la dokumento de Eŭropa platformo de neregistaraj organizoj por multlingvismo en kiu oni akcentas gravecon de propedeŭtikeco por plibonigo de multlingveco kaj ene de ĝi gravan rolon de Esperanto; aprobo de EU financi grandan eŭropan projekton Lingvo.info; transdono de eŭropa popoliniciato kun propono kanti eŭropan himnon per vortoj de U. Broccatelli en Esperanto; eldono de libro kun superrigardo de la eŭropaj movadoj elektronikforme; kunveno kun EP-prezidanto Buzek; organizo de du kongresoj al kiuj la aŭscipiantoj estis du ŝtatestroj (la irlanda kaj la kroata)... La estraro do konstatis ke estus bone ke tia sukcesa kaj unueca teamo plu gvidu la eŭropan movadon dum plia mandato aldonante unu plian membron, junan aktivulinon kaj oficistinon en Bruselo.

Do, la estraro proponas la jenan liston por la estraro de EEU en la mandato 2014-2017:

Seán Ó Riain, (irlanda diplomato en Bruselo), kandidato por la prezidanto,

http://eo.wikipedia.org/wiki/Se%C3%A1n_%C3%93_Riain

Flory Witdoeckt, (belga entreprenistino), kandidato por vicprezidantino kaj kasistino

http://eo.wikipedia.org/wiki/Flory_Witdoeckt

Zlatko Tišljár (slovena kaj kroata emerito), kandidato por la sekretario

http://eo.wikipedia.org/wiki/Zlatko_Ti%C5%A1ljár

Nikola Rašić, nederlanda profesia interpretisto, lingvisto, kandidato por la estrarano pri

sciencaj aferoj; http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikola_Ra%C5%A1i%C4%87

Peter Baláž, (slovaka entreprenisto), kandidato por estrarano pri novaj teknologioj;

http://eo.wikipedia.org/wiki/Peter_Bal%C3%A1%C5%BE

Sandra Schweder (Germana tradukistino en Bruselo), kandidatino por la estraranino pri

junularaj demandoj <http://be.linkedin.com/pub/sandra-schweder/b/924/561>

La elektoj okazos dum la asemblea kunsido en Rijeka la 8-an de julio 2014.

Zlatko Tišljár

KATALUNOJ DEMANDAS KANDIDATOJN POR LA EŬROPA PARLAMENTO



Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) pretigis demandaron senditan al la diversaj katalunaj politikaj partioj kiuj partoprenos en la venonta voĉdonado por la Eŭropa Parlamento la 25an de majo, cele ke ili respondu laŭ ties politika programo.

La demandoj senditaj estis la sekvaj:

1. Kiun rangon vi konsideras, ke la kataluna kaj la okcitana lingvoj devas havi en la eŭropaj institucioj?
2. Ĉu vi konsideras justa la nuntempan sistemon pri lingva uzado ene de la eŭropaj institucioj kaj ties rilaton kun la eŭropaj civitanoj?
3. Kiujn mezurojn vi konsideras prenendaj en la EU-aj institucioj por efektiviigi la principojn pri egaleco, ne-diskriminacio kaj justeco kadre de lingvoj?
4. Ĉu vi konsideras ke la internacia lingvo Esperanto povas esti konsiderinda kiel ilo por garantii efektivan interkomunikadon en egaleca situacio por ĉiuj civitanoj de la EU sendepende de ilia gepatra lingvo?
5. Kiujn vojojn vi imagas, por ke Eŭropa Unio agu sur la edukaj politikoj de la ŝtatoj, membroj de EU, por faciligi la interkomunikadon inter eŭropaj civitanoj, kaj samtempe stimuli la lingvan diversecoj? Aŭ vi kredas, ke nur la instruado de la angla estas promociinda?

KEA agadas por diskonigi la problemojn pri lingva malegaleco kaj Esperanton en la Kataluna Landaro, kaj por faciligi la lernadon kaj la praktikadon de la internacia lingvo.

Ĉi tiu artikolo aperis en La Balta Ondo:

<http://sezonoj.ru/2014/04/kataluna-2/>

KROATIAJ ESPERANTISTOJ RICEVIS PREMION CIGNO 2014

Kiam en 2014 Kroatio fariĝis membro de Eŭropa Unio, Kroata Esperanto-Ligo ricevis rajton kandidati por Premio Cigno. Spomenka Štimec, sekretariino de Kroata Esperanto-Ligo ekde 1995 kolektas informojn pri artikoloj, radio kaj TV-elsendoj. Tiuj dokumentoj estas arkivigitaj en kelkaj skatoloj en la oficejo de KEL.

Decidinte kandidati, KEL informis membrojn kontribui per artikoloj kaj surbendigo de TV kaj radio-elsendoj kiujn ili mem kreis kaj publikigis aŭ trovis en amaskomunikiloj. Plej multajn dokumentojn pri la informado pri Esperanto en 2013 en Kroatio kontribuis Davor Klobučar kaj Tihana Mikša esplorinte la publike atingeblajn informojn.

Rilate informadon Kroatio estas iom specifa lando pro kontinueco de la agado por Esperanto en la kampo de kulturo tra pasintaj jardekoj. Per tiu kontinueco de pasintaj jaroj Esperanto eniris en la realan vivon ĉirkaŭ ni kaj la informado okazas eĉ se esperantistoj ne informas. Mi volis montri tiun econ de nia informado per kandidatigo por la Premio Cigno. Ekz. facile okazas ke oni en Kroatio rigardas amuzan TV-programon nomata „kvizo“ „Mi ŝatas Kroation“ kaj subite aŭdas demandas „En kiu lingvo aktorino kroata aktorino Vida Jerman?“ Estas agrable aŭdi ke la demandita teamo sciis la respondon: Esperanto. Krom al aktorino Vida Jerman ni ŝuldas du TV-elsendojn en kiuj Esperanto estas videbla al verkistinoj Antoaneta Klobučar (pri ŝiaj libroj tradukitaj per Esperanto japanen) kaj al Spomenka Štimec

pri Hrvatska Kostajnica kaj la kvaran al bibliotekistino Vesna Radošević pri tradukisto Sekoguchi Ken. (Lak vina TV-elsendo pri Rejkjaviko kiun aranĝis Judita Rey Hudeček bedaŭrinde ne realiĝis.)



En Kroatio povas okazi ke oni aŭskultas literaturan radian programon „Forgesitaj voĉoj“ kaj aŭdas intervuon kun la kroata poetino Višnja Stahuljak, kiu rakontas ke ŝiaj poemoj en Esperanto aperis en Brazilo kaj Islando. En alia radio-programo kroata verkisto Jurica Pavičić neestime parolis pri Esperanto, sed diris ke lia literatura procedo en certa verko estas kunmetita iom laŭ

la ecoj de Esperanto.

Kvankam ĉefaj radio - elsendoj estis elsenditaj per Kroata Radio kaj venis el la ĉefurbaj radiaj studioj, estis agrable kompreni ke pluraj lokaj radioj informis pri nia agado inter aliaj Radio Marija Bistrica.



Agrablas ke Filozofia fakultato disponigas informojn kiel eblas studi pri Esperanto kaj interlingvistiko, bonas ke Turismaj asocioj de Rijeka kaj Zagreb disponigas plurajn informojn pri Esperanto en siaj paĝoj.

Grandega artikolo en Glas Istre okaze de la forpaso de nia honora membro, prestiĝa kulturulo d-ro Ivo Borovečki, abunde traktis lian laboron pri Esperanto.

Surprizis ke Katolika agentejo plurfoje traktis Esperanton ĉu memorigante pri la papo Pio la Deko, la papo de malriĉuloj, pri dankoj de esperantistoj al la Papo Benedikto la 23a, aŭ pri raporto pri la kongreso de katolikaj esperantistoj.

Ĉar kroataj esperantistoj en la jaro 1972 fondis la plej malnovan zagreban teatran festivalon PIF (Pupteatra Internacia Festivalo), oni ĉiujare, informante pri la festivalaj teatraĵoj ĝentile memoras la fondintojn. En 2013 multaj informoj rilatis al fondintoj-esperantistojde Studenta Esperanto-Klubo.


Ĉar la premio Cigno naskiĝis en Japanio, mi aparte elstarigis en mia listo TV-elsendon kreitan en biblioteko Travno pri japana tradukisto Sekoguchi Ken kaj lia japanigo de „Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić“ per Esperanto.

Prikulturaj artikoloj en Kroatio multe pli abundas ol movadaj, kvankam kolegoj esperantistoj-fervojistoj kontribuis du artikolojn pri movada agado aperinta en la kroata faka revuo por fervojistoj kaj nia meritoplana membro-jurnalisto Davor Grgat sendis al ni plurajn primovadajn kontribuojn, inkluzive tiujn kiuj kreis bela lastsomera Adriatika feriado, entreprenita de Josip Pleadin, pri kiuj Grgat raportis. Plurajn paĝojn de dokumentoj por Premio Cigno sendis al ni

Espranto-Societo Rijeka, kiu kutimas per pagitaj anoncoj varbi lernantojn por siaj Esperanto-kursoj kaj kiu uzas Esperanton por amuziĝi en la karnavalaj festoj. Eble la pagitaj anoncoj kaj karnavalumado ne alportas multajn kursanojn sed ili alportas scigon ke Esperanto daŭre estas flegata.

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto septembro 2006



- ★ Florenco gastigis la 91-an Universalan Kongreson de Esperanto
- ★ Sarajevo organizis Internacian Junularan Kongreson - IJK
- ★ Esperanto - lingvo en la retejo de Konsilio de Eŭropo
- ★ Mortis William Auld - la plej granda Esperanta poeto
- ★ Esperanto-societo en Velika Gorica refondita

Estis bele vidi Esperanton ĉeesta en multaj publikaj portaloj, ekz. de Turismaj asocioj de Zagrebo kaj Hrvatska Kostajnica. Ofte informoj pri Esperanto eniris portalojn de urbaj bibliotekoj, ekz. okaze de pluraj prelegoj (en kiuj Esperanto rolis) de Spomenka Štimec sed ankaŭ ekz. ĉe la portalo de Nafta Kompanio INA, kie Josip Pleadin reprezentis Kroatan Esperanto-Ligon, okaze de preparoj de grava kulturaranĝo „Picokijada“. Esperanto-Societo el Križevci, Sisak, Karlovac kaj Varaždin disponigis per lokaj portaloj informojn pri sia agado por Esperanto en 2013.

Aliflanke revuo por esplorado de porinfana literaturo „Libri kaj liberi“ enhavis plej grandan artikolon pri Esperanto kiel lingva ponto, en 2013 verkita de Spomenka Štimec.

Gravan kontribuon al la listo faris prezidantino de KEL Judita Rey Hudeček kun pluraj elsendoj pri Esperanto, eĉ kiam oni intervjuas ŝin pri la makedona kulturo kaj pri kroataj tradukistoj. Estas interesaj deklaroj pri Espranto de lingvistino Snježana Kordić en

Portalo Autograf.

Apartan reeĥon en amaskomunikiloj havis vizito de irana esperantistino kaj ŝiaj radio-intervjuoj pri persigo de „Hlapić“ kiuj aperis ĉe la elsendo „Al kroatoj ekster Kroatio“ ne nur en la kroata sed ankaŭ ĉe la hispana radio-redakcio.

Ke niaj membroj aktivas pri Esperanto ankaŭ eksterlande montris la plej ampleksa sociologia artikolo pri identeco publikigita de Zlatko Tišljar en la slovena. Hungara gazeto Magyar Napló raportis pri la libro de Geza Gardonyi kaj ties traduko per Esperanto kroaten. Nesupereble konvinka pri la kapabloj de Esperanto estas TV-elsendo kiun nia juna membro Kaja Farszky realigis en majo 2013 en Katalunio kun sia amiko Carles, parolante pri Esperanto kaj la kroata kuirarto en la ege populara kataluna kuirista TV-programo.

En nia listo de dokumentoj videblis ankaŭ agado de ĵurnalisto Tomislav Radić, unu el malmultaj nacilingvaj ĵurnalistoj kiuj persone raportis el Universala Kongreso de Rejkjaviko por Kroata Radio. Estas interese vidi ke en portaloj de Slavonski Brod kaj Samobor informojn el historio de Esperanto antaŭ 80 aŭ 60 jaroj, kiuj ankoraŭ gravas por tiuj medioj.

Ne ĉiuj societoj pretis disponigi siajn reeĥojn pri informado pri Esperanto en Kroatio por Premio Cigno: ekz. Bjelovara Esperanto-Societo kontentiĝis per informo ke oni siajn publikigitajn artikolojn disponigas al Dokumenta Esperanto-Centro Đurđevac. Đurđevac ne emis flegi siajn rilatojn kun Kroata Esperanto-Ligo en 2013.

La listo pri reeĥoj pri Esperanto en gazetaro en Kroatio en 2013 estus multe pli longa se ni enmetus en ĝin dokumentojn de agado de ĉiuj 20 Esperanto-Asocioj kiuj membris en KEL en 2013. Nia listo estus pli riĉa kun kontribuoj de ekz. Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto, Kroata Esperanto-Junulara Asocio kaj Esperanto-Societo en Velika Gorica. Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj kaj Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj kiuj eldonas siajn gazetojn en Esperanto („Zagreban Esperantiston“ kaj la sonan eldonon de „Tempo“). Sentebblas ke tuj societoj sekve disponas pri malpli da energio por informado en la nacia lingvo, kvankam ilia kontribuo al informado estas ekstreme granda. La centoj de artikoloj pri reeĥoj pri Esperanto en Kroatio por Premio Cigno sufiĉis. Dankon al s-ro Etsuo Miyoshi por stimuli nian agadon per Premio Cigno. Post Britio kaj Ĉeĥio venis vico de Kroatio. Al kiu lando iros la venonta Premio Cigno?

Spomenka Štimec

PRI HISTORIO DE PANEŬROPA IDEO



»La historio de paneŭropa ideo estas senpere ligita kun la nomoj de du eksterordinaraj personecoj: kun ties fondinto Richard grafo Coudenhove Kalergi (1894-1972) kaj ties daŭriganto kiel internacia prezidanto de la Paneŭropa Movado (ĝis 2004) d-ro Otto von Hansburg (naskita en 1912).«
 »La vizion de politike, ekonomie kaj defendarmee unuigita Eŭropo formulis Coudenhove unue en la artikolo »Paneuropa – ein Vorschlag« (Paneŭropo – propono) la 15-an de novembro

1922 en „Vossische Zeitung“ en Berlin kaj du tagojn poste en »Neue Freie Presse« en Vieno.«

Tio estas asertata nur pro la simpla nekono de la faktoj, ke Ludoviko Zamenhof jam en la jaro 1915 formulis siajn ideojn pri la futuro de Eŭropo en sia "Alvoko al la Diplomatoj".

Mi citas el la libro de Giordano Moya "Esperanto en prospektivo":

»Fine en 1915 dum plena mondmilito, kiun Zamenhof ne sukcesis travivi, en la traktato "1915 Post la Granda Milito - Alvoko al la Diplomatoj" li pledas por la principo: Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj" kaj asertas ke "plej bone estus, se anstataŭ divesaj grandaj kaj malgrandaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn "Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo".

Attila Schimmer

PRELEGO “ESPERANTO: LINGVO DE LA ESTONTECO” EN LA FONDERIE, BRUSELO



Dimanĉon, la 27-an de aprilo la prezidanto de EEU, d-ro Seán Ó Riain prelegis kaj respondis al demandoj dum horo kaj duono pri “Esperanto: lingvo de la estonteco” en La Fonderie, brusela centro pri socia kaj industria produktado.

<http://www.quefaire.be/conferene-esperanto-481622.shtml>

La intereso venis de tio ke la centro organizas serion da prelegoj pri la minejoj de zinko en Belgio. Unu el la plej grandaj zinkminejoj estas en Neŭtrala Moresnet, ŝtateto inter la belgaj, germanaj kaj nederlandaj landlimoj kiu ekzistis de 1915 ĝis 1918, kiu nomis sin “Amikejo” kaj deklaris Esperanton sia oficiala lingvo. Venis ĉirkaŭ 20 homoj, kaj inter ili estis kelkaj esperantistoj. La demandoj montris grandan intereson pri Esperanto kaj la diskuto estis pozitiva. La prelego okazis en la franca, kaj la preleganto finis per kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto. Antaŭe li disdonis la tekston, kun francaj kaj nederlandaj tradukoj.

La prelego estis vaste reklamata en la reto, kaj helpis montri al ne-esperantistoj en Bruselo ke Esperanto estas daŭre aktuala.

Seán Ó Riain



LA GERMANA PARTIO ÖDP SUBTENAS ESPERANTON

La germana partio ÖDP (Ökologisch-Demokratische Partei) <https://www.oedp.de> estas supozeble la sola partio, kiu montras certan inklinton al Esperanto en sia programo por la Eŭropaj balotoj.

La ÖDP subtenas strebojn por plibonigo de rekta komunikado inter EU-civitanoj, ekz. per uzo de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto.

Tiu decido aldoniĝas al la Eŭrop-politika Programo de la Partio. En la dokumentoj troveblas la jenaj argumentoj.

http://wiki.oedp.de/wiki/Bundesparteitag_2014.1/Antraege/47-EPP-1

Ŝajnas, ke ÖDP realigis la travideblecon, kiun la piratoj celis. Eĉ la menuo (komplete vegetara) dum la partitago estas legebla en la reto.

http://wiki.oedp.de/wiki/Bundesparteitag_2012.2/Verpflegung

Roland Schnell

MANIFESTO EŬROPO PROGRESA (ALVOKO AL SCIENCISTOJ ESPERANTISTOJ SUBTENI)

La 8-an de aprilo grupo da italaj sciencistoj (multajn mi konas persone) lanĉis la Manifeston petante aliĝon de aliaj eŭropaj sciencistoj. La tekston de la Manifesto, kun la ligilo por perreta aliĝo, vi povas legi en retpaĝo http://www.osservatorio-ricerca.it/sondaggi/foreurope2014/registrazione_survey.php, sed... nur en la itala kaj angla lingvoj. La traduko al Esperanto estas alligita al ĉi tiu artikolo. Nur se vi samopinias kun la iniciato, bonvolu subskribi la aliĝformulon, menciante en via aparteno al scienca instanco, ke vi apartenas (ankaŭ) al AIS.

Nicola Minnaja

Manifesto Por Eŭropo progressa



La mondo rapide transformiĝas. Socio kaj konekonomiko profunde redeseĝnis ekvilibrojn agnoskitajn kiel firmiĝintaj. Depresiaj terpartoj akiris, rapidege laŭ historia temposkalo, grandegajn kapablojn por evoluo kaj kresko. Kono, kulturo kaj novigo konsistigas pli ol iam ajn decidan trenon al estonteco.

Male Okcidento, kaj iuj aspektoj de ĝia evolumodelo, profunde kriziĝis. Eblas konstati ke precipe Eŭropo estas atakata de gravegaj kaj ŝajne nesolveblaj problemoj: senlaboreco, krizo de la produktosistemo, rimarkinda plimalboniĝo

de la bonstato. Malmultajn jarojn post sia formala ekesto, per la oficiala naskiĝo de la komuna mono, Eŭropo riskas malaperi kiel revo de civitana komunumo, strebanta al nova komuna Nacio: pli ampleksa ne nur teritorie, sed ĉefe sur la tereno de la rajtoj, de la valoroj kaj de la oportunoj. La usona historiisto Walter Laqueur parolis pri "fino de la eŭropa revo". La respondecoj estas malsamaj kaj disaj, kaj certe inter ili estas la troa timemo en la proceso por politika konstruo de la eŭropa subjekto: pro tiu timemo ĉi horizonto politika, kultura kaj socia estas prezentata nur per la severaj trajtoj de la "kalkuloj en ordo". Tio estas la Eŭropo de marĉandistoj kaj bankistoj, de limigo kaj rigoro: kvazaŭ policano trudanta limigojn ofte sensencajn, anstataŭ puŝanto por ampleksigo de perspektivoj al estontecaj evoluoj. Ĝuste tial, okaze de la krizo, ni rimarkas impresan kreskon de lokaj egoismoj, de partikularismoj kaj de faktaj naciismoj. Fenomenoj ofte organizitaj intence por ekspluati realajn misfartojn kaj eĉ suferosituaciojn, sed kiuj riskas okazigi reagojn ĝuste malajn al tio, kion nun bezonus la eŭropaj popoloj.

Kiel sciencistoj de ĉi kontinento - konsciaj pri ekzisto de nerompebla konekso inter scienco kaj demokratio – ni sentas la bezononon eniri la ludon. Ni daŭre asertas, ke la konstruproceso de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo estas la plej grava oportuno al ni konsentita de la Historio; ke socio kaj konekonomiko - esencaj por reala evoluo civila, paca, ekonomia kaj kultura - sin nutras per kunligitaj kaj kunlaboremaj komunumoj, per intensa kaj produktiva komunikado kaj per kritika emo, kiu traprenetru ĉiam pli vastajn sociajn tavolojn.

Tial la nura ebla respondo al la minacanta krizo estas konstruo de Eŭropo de popoloj, de Eŭropo Progressa! Realigota subaze de principoj de libereco, demokratio kaj solidareco. Ni flegas la saman esperon per kiu Albert Einstein kaj Georg Friedrich Nicolai per sia "Manifesto al la Eŭropanoj" en 1914 memorigis al la eŭropaj popoloj kia malfeliĉo estas milito, kaj per kiu Altiero Spinelli, Eugenio Colorni kaj Ernesto Rossi inspiris la ideon de

Eŭropo en sia "Manifesto de Ventotene" en 1943. La samajn ideojn sendepende apogis eminentuloj el ĉiuj landoj de Eŭropo. Ni celas revivigi kaj etendi al Eŭropo la spiriton, kiu en 1839 igis la italajn sciencistojn organizi sian unuan kunvenon kaj per ĝi inaŭguri la Releviĝon de disigita lando.

Ni intencas aranĝi en Pisa la "Unuan kunvenon de la Eŭropaj sciencistoj" kaj proponi ke vi partoprenu.

EDE-BULGARIO KONATIGIS KANDIDATOJN POR EP KUN LA PROGRAMOJ DE EEU KAJ EDE

En la granda salono de la Urbodomo Karlovo okazis antaŭbalota kunveno de Bulgara Socialista Partio /BSP/, kiu nun regas en Bulgario. La salono estis plene kun simpatiantoj de BSP, reprezentantoj de oficialaj instancoj, gvidantoj de sociaj senprofitcelaj organizaĵoj. La kunvenon partoprenis ankaŭ prof. Bojĉidar Leonov invitita kiel aŭtoritata sociaganto en la lando kaj prezidanto de EDE-Bulgario, AIS-Bulgario, TOLE, Regiona Estraro en Karlovo de Scienc-teknikaj asocioj kaj gvidanto de diversaj regionaj kultur-edukaj organizaĵoj.



S-ro Georgi Pirinski, vicprezidanto de Bulgara Socialista Partio kaj kandidato por la Eŭropa Parlamento prezentis la programon de BSP, gvidis la diskutojn kaj respondis al demandoj de la partoprenintoj. Li estas unu el la plej famekonataj kaj eminentaj bulgaraj politikistoj, eksa Prezidanto de Bulgara Parlamento. Gvidantoj de diversaj senprofitcelaj sociaj organizaĵoj prezentis kaj raportis pri la agado de siaj organizaĵoj, donis demandojn.

Prof. B. Leonov konatigis s-ron G. Pirinski kun la bazaj

principoj de la monda E- Movado: egaleco inter la homoj sendepende de ilia nacia, lingva politika, etna kaj religia aparteneco. Li prezentis la celojn en la agado de EEU, EDE kiuj obeas tiujn principojn kaj agas kontraŭ la lingva diskriminacio. Li informis ankaŭ s-ron Pirinski, ke jam estas fondita EDE- Bulgario, kiu komencis sian agadon kiel kunorganizanto de la Internacia E-Festivalo en Karlovo, dum kiu por la unua fojo en Bulgario estis kantita esperante la Eŭropa himno. Per fortaj aplaŭdoj la ĉeestintoj de la kunveno esprimis sian pozitivan rilaton al la agado de prof. B. Leonov kiam li parolis kontraŭ la lingva diskriminacio, pri la organizitaj, kun la subteno de la regionaj oficialaj instancoj en Karlovo, simpozioj pri praktika apliko de Esperanto en la profesia agado/AEPA/, kies organizintoj estis la esperantistoj-membroj de EEU, EDE, AIS kune kun FSTA kaj Bulgara Akademio de la sciencoj kaj kies sukceso kontribuis al la konkludo, ke Esperanto povus kaj devus esti aplikota kiel kontaktlingvo por solvo de la lingva problemo. Prof. B. Leonov demandis s-ron G. Pirinski pri lia rilato al la multlingveco en la Eŭropa Parlamento, pri la valoro de Esperanto kiel neŭtrala kontaktlingvo kaj ĉu li subtenus rezolucion, se estus proponota pri pozitiva rolo de Esperanto en la solvo de la lingva problemo.

S-ro G. Pirinski dankis al prof. B. Leonov kaj esprimis sian pozitivan rilaton al Esperanto kiel ebleco por solvo de la lingva problemo, informinte la ĉeestintojn ke li subtenus rezolucion, se ĝi estus prezentota en la Europa Parlamento, lige al agado kontraŭ la lingva diskriminacio kaj la rolo de la internacia lingvo Esperanto por solvo de la lingva problemo.

Post la oficiala parto de la kunveno okazis aparta renkonto de prof. B. Leonov kaj s-ro G. Pirinski dum kiu ili pridiskutis la eblecojn pri estonta kunlaboro inter EDE-Bulgario kaj la bulgaraj EP-deputitoj.

La kunveno kaj la aldona renkonto de prof. B. Leonov kun s-ro G. Pirinski estis prezentita en la novaĵoj de la regiona televido.

Boĵidar Leonov

ESPERANTO POR ABITURIENTA DIPLOMO EN FRANCI

Inter Aprilo 2011 kaj fino de 2012, la francaj Esperanto-asocioj SAT-Amikaro kaj Espranto-France kolektis pli ol 33 000 subskribojn al petskribo, ke Esperanto estu akceptata kiel nedeviga fako por abiturienta diplomo. La petskribon subskribis dekoj da deputitoj, multaj famuloj, urbestroj.

Delegacio kvinhoma: Emmanuel Debanne (kunordiganto de la kampanjo), Guy Cavalier (prezidanto de SAT-Amikaro), Axel Rousseau (prezidanto de Espéranto-France), François Lo Jacomo (Akademiano kaj ekzamenanto) kaj Dorian Reale-Caron (16-jara lernanto), oficiale portis la tuton al la Ministerio pri edukado, vendredon, la 21an de marto, je la 17a horo. La delegacion akceptis Isabelle Robin, oficejestro pri mezlernejo.

Katalin Kovacs

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Spomenka Štimec, Attila Schimmer, Roland Schnell, Boĵidar Leonov, Nicola Minnaja, Katalin Kovacs, La Balta Ondo

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

